



La Riverego

Somero de 1997

Esperanto-Societo Kebekia

N^o 47^a, Jaro 12^a

Fromaĝa semajnfino

Konrad Hinsen

Les jeunes espérantistes français allient gastronomie (et gourmandise), tourisme et publicité. De notre correspondant à Grenoble...

De la 4^a ĝis la 6^a de aprilo okazis en Grenoblo la dua *gastronomia semajnfino* de la Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO). Post la tre sukcesa lastjara *ĉokolada semajnfino*, oni nun elektis malpli dolĉan temon : fromaĝo. La 27 partoprenantoj, ĉefe el Francio sed ankaŭ el Italio kaj eĉ Bulgario, kune kuiris laŭ speciala preparita receptaro tre diversajn pladojn, kiuj tamen ĉiuj enhavis fromaĝon. Poste oni manĝis, kompreneble, kutime pli malfrue ol atendate, ĉar la preparado ĉiam bezonis pli da tempo pro ĥaoso, manko de spaco, manko de sufiĉaj kuiriloj, sed ĉefe pro troa babilado, bedaŭrinde ofte krokodila...

Inter la gastronomiaj programeroj oni ĉefe profitis la belegan veteron por promenadi. Sabaton posttagmeze okazis la ĉefa eksurso : la celo estis malnova fortikaĵo sur monto tuj norde de la urbocentro. Post la 1244 ŝtupoj la grimpintoj evidente iom lacis, sed ne povis longe ripozi : jam atendis ĵurnalistoj de loka televidstacio, kiu dum preskaŭ unu horo filmis kaj intervjuis. La rezulto estis triminuta raporto en la vespera regiona

novajelsendo. Kaj poste oni tuj kuris malsupren por ne maltrafi la akcepton ĉe la urbestro en la urbodomo, kiu estis komune aranĝita kun la partoprenantoj de la kongreso de la Rodan-Alpa Esperanto-Federacio, kiuj samtempe okazis en Grenoblo.

La sekva gastronomia semajnfino, la krespa, okazos venontan septembron en Bretonio. Kaj oni jam planis fiŝan semajnfino ie apud la maro, kaj ripeton de la ĉokolada semajnfino. Frandemuloj de ĉiuj landoj, unuiĝu !

Nous aimerions vous voir !

Normand Fleury

La Société québécoise d'espéranto organise diverses rencontres au cours de l'année. Il y a parfois plus de 25 participants et parfois 5...! Nous savons qu'il n'est pas réaliste de penser réunir l'ensemble de nos membres lors une même rencontre. Cependant, il serait agréable à l'occasion de voir poindre de nouveaux visages. La rencontre de juin à Sainte-Catherine-de-Hatley (Lac Magog) est l'endroit parfait pour vous joindre à nous. Une auberge sympa, un lac, des

embarcations (canots, pédalos, chaloupes), une piscine, le grand air pour la fin de semaine ... pour la modique somme de 25 \$ (30 \$ pour les non-membres de la S.Q.E.) et avec possibilité de cuisiner sur place. Pour plus de détails, consultez l'édition précédente de *La Riverego*, ou contactez-moi. Au plaisir !
Téléphone : (514) 495-8442.
Courriel : <Normand.Fleury@sympatico.ca>.

La kvara Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista

Vous trouverez ci-contre toutes les informations concernant la plus rapprochée des rencontres espérantistes internationales, qui a lieu chaque automne à Ludlow (Vermont). Inscrivez-vous rapidement, surtout si vous désirez vous loger à bon prix.

Ĝi okazos en Okemo, Vermonto, Usono, de la 11^a ĝis la 13^a de oktobro 1997 (Dank-festo en Kanado, Kolumbo-festo en Usono).

Kio estas A.R.E. ?

A.R.E. celas kunigi esperantistojn el nordorienta Ameriko dum tritaga semajnfino. Organizas ĝin Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj esperantistaj asocioj en Usono.

Programo de A.R.E.

La programo estos trinivela, kurso por komencantoj per la vidbendo *MAZI en*

Gondolando, kurso por progresantoj kaj diversaj prelegoj por la lertuloj. Estos ankaŭ kultura vespero kaj diversaj ekskursoj en la naturo aŭ al apudaj vidindaĵoj. Ni invitas vin prepari ion por prezenti sed nepre informu nin almenaŭ du monatojn

antaŭe, por ke ni povu plani la programon.

Invitu viajn familianojn kaj konatojn ĉar la gastejo situas en tre bela montara regiono, kie ili povos ripozi dum vi

esperantumos. Venu ĝui internacian amikan etoson.

Loĝado

NB : Ĉiuj prezoj indikitaj estas en usonaj dolaroj. Vi havas du eblecojn por loĝado : ĉu loĝi aŭ ĉe *Okemo Mountain Resort*, kie okazas A.R.E., aŭ en Ludlow. Okemo estas belega feriejo kiu povas esti malpli multekosta ol loĝado en Ludlow. Ĉiu apartamento ĉe

Claude Piron venos !

Normand Fleury

En oktobro 97, okazos denove la aŭtuna renkontiĝo en Okemo, Vermonto. Dum la pasintaj jaroj, tiuj kiuj venis vere ĝuis la belegan montargastejon, la amikecan etoson, la internaciecon de la ĉeestantaro kaj la varian programon.

Ni certas ke ĉi jare, la renkontiĝo estos eĉ pli bona. Claude Piron, fama verkisto, lingvisto kaj esperantisto el Svislando, jam anoncis sian alvenon. Liaj edzino kaj filino ankaŭ venos. Li pretas prelegi pri la « Esperanto, kiaj perspektivoj ? », kaj eĉ kanti dum la kultura vespero. (Li jam eldonis kasedon « Frandu Piron »). Ne maltrafu la okazon renkonti lin dum pli intima renkontiĝo ol la Universala Kongreso de Esperanto !

Vizitu nian retan paĝon pro pliaj detaloj kaj tuj aliĝu. Vi povas ankaŭ kontakti nin faksile aŭ lasi mesaĝon ĉe la respondilo (514) 272-0151.

Kiuj venas ?

Dum la pasintaj A.R.E., 40 ĝis 50 esperantistoj el Ontario, Kebekio, Nov-Skotio, Nov-Anglio, Nov-Jorkio kaj el eŭropaj landoj (Britio, Germanio) partoprenis entuziasme. La plej junaj aĝis 8 kaj la plej aĝaj 80.

Okemo havas plenkipitan kuirejon (vi devas alporti nur manĝaĵon). La apartamentoj ĉe *Kettle Brook* kaj *Winterplace/Ledgewood* ankaŭ havas manĝejojn kaj salonojn kun kamenoj (kun brulligno) kaj televidiloj (kun

sekvo...

La Riverego (Le fleuve) est publiĉ par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 125 exemplaires sur papier recyclé. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 125oble sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / limdato por la venonta numero : 1997.09.01.

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Suzanne Bolduc, Probal Dasgupta, Normand Fleury, Konrad Hinsen, Marco Maertens kaj Stephen Sloan. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Marco Maertens (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Jean-Claude Bélanger, Márta Dikman.

Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur et télécopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo : (514) 272-0151

mmaerten@cam.org

<http://www.cam.org/~mmaerten/esk.html>

Leĝa devigo trarompi la izolon

Ivo Durwael

Le secrétaire de la Ligue d'espéranto de Flandre raconte comment de nouvelles contraintes pour acquérir les subventions du gouvernement ont heureusement forcé la Ligue à offrir ses services à d'autres associations culturelles et sociales, à s'ouvrir sur le monde.

En la centro de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) plentempe laboras nur 3 oficistoj, tamen la kuna deĵortempo de ĉiuj 7 dungitoj egalas al 5 postenoj tuttempaj. Altaj ciferoj kompare al la nombro de la esperantistoj en Flandrio (FEL havas ĉ. 420 membrojn), des pli ke la kotizo de FEL estas surprize pli malalta ol tiu de E-asocioj en la najbaraj landoj. Vivteni tian centron eblas nur dank'al enspezigaj agadoj — precipe la eldono de la internacia magazino *Monato* kaj de libroj — kaj al ŝtataj subvencioj.

Ekde sia fondiĝo FEL ricevadas konsiderindajn subvenciojn de la kulturministerio, unue belga kaj nun flandra. Tamen ĉiujare la estraro kaj la oficistaro havas zorgojn pri la ekvilibro de la bilanco. La ministeriaj subvencioj egalas proksimume la salajron de la direktoro. Se tiu sumo forfalus, supozeble la centro kolapsus.

La flandra situacio estas beno sed samtempe enhavas grandan riskon. Ĝis 1995 FEL ricevis subvenciojn surbaze de la pruvitaj agadoj de la centro kaj de la diversaj lokaj grupoj kune. En aprilo 1995 la flandra registaro voĉdonis novajn dekretojn. La nunaj normoj ebligas al FEL esti rekonata kiel kultura asocio nur se ĝi kapablas disponigi servojn al aliaj sociaj-kulturaj asocioj, institutoj aŭ instancoj, kio necesigas transformon de la asocio. La estraro longe pridiskutis la problemon.

FEL troviĝis antaŭ granda defio. Ni konsciis ke la nova situacio devigas nin trarompi tendencon ĝeneralan en eŭropaj Esperanto-asocioj: mi pensas pri la inklino enfermi sin en propran rondon kaj dediĉi la disponeblajn tempon kaj energion preskaŭ nur al la vivteno de agadoj por la membroj. FEL

ja havas belan tradicion de rilatado kun amaskomunikiloj kaj kun neesperantistaj organizaĵoj. Sed en la jaro 1996 ni disponigis niajn servojn — informante aŭ organizante prelegojn kaj kursojn — jam al 2 kulturcentroj, 2 bibliotekoj, 7 lernejoj kaj 17 kulturaj asocioj.

Mi aktivis de post 1960, sed mi havas la impreson ke neniam antaŭe ni rilatis kun tiom da asocioj. Restas la konstanta devo ĉiujare agadi simile. Malgraŭ aro da organizoj kaj precipe administraj problemoj, la nova situacio donis renovigan impulson. Mongtriĝas ke la strebo por organizi agadojn pri Esperanto en la kadro de aliaj asocioj havas multajn avantaĝojn: ni atingas novan publikon; ni ŝparas multe da mono kaj energio, ĉar ni lasas la zorgojn pri informado kaj organizado al aliaj homoj; tiuj organizoj disponigas ofte pli favorajn kondiĉojn ol ni kutimas: modernajn, bone

...La kvara...

vidbend-aparatoj). Se vi preferas loĝi ĉi tie, vi povas fari viajn aranĝojn rekte kun Okemo, aŭ vi povas kontakti nin, por ke ni faru gruparanĝojn.

Kiel mendi ?

Vi povas kontakti la feriejon (anglalingve) por scii la prezojn por apartamentoj ĉe Okemo kaj ricevi informilon.

- telefone : 1-800-78-OKEMO
- retpoŝte : <okemo@ludl.tds.net>
- sur la TTT : <<http://www.okemo.com/survey.html>> (formular-kongrua TTT-krozilo bezonata)

Gruparanĝoj

Ni faros la aranĝojn laŭ kiel eble plej malalta kosto. Vi havos tri elektojn (prezoj inkluzivas la krompagon kaj

ekipitajn prelegejojn kaj klasĉambrojn, kompenson por prelegantoj aŭ instruistoj; la etoso de formortinta movado malpliĝas ktp.

Kiel ni akiras tiujn kontaktojn? Ni proponas al la aktivuloj en lokaj kluboj peti la liston de ĉiuj kulturassocioj en sia komunumo. Ni sisteme provas kontakti la organizantojn de prelegoj, kursoj, debatoj ktp. Ni informas pri tio kion ni — t.e. la loka grupo kaj/aŭ la Esperanto-centro — povas kunorganizi. El tiuj kontaktoj povas estiĝi novaj, ĉar gvidantoj de asocioj ofte havas rilatojn kun aliaj grupoj. Tiel, ni esperas, iom post iom Esperanto fariĝos pli konata en la kulturemaj medioj de Flandrio.

Ĉu la sperto de FEL inspiros aliajn aktivulojn ne atendi iun oficialan premon, sed tuj ŝanĝi sian agadpolitikon? [El *Esperanto*, n^o 1091, aprilo 1997]

imposton; ĉiu loĝanto devas surloke pagi redoneblan kaŭcion de 20 \$ por ŝlosilo):

1. Vi havu privatan dormĉambron (ĝis 2 homoj). La kosto por 2 noktoj estos 147,13 \$ en 2-dormĉambra apartamento aŭ 113,78 \$ en 3-dormĉambra apartamento.
2. Vi kunokupu dormĉambron kun alia esperantisto. Kelkaj dormĉambroj havas ĝemellitojn, sed la plejpartoj havas aŭ reĝin- aŭ reĝ-liton. Eble vi kundormos en la sama lito. La kosto por 2 noktoj estos 73,56 \$ en 2-dormĉambra apartamento aŭ 57,89 \$ en 3-dormĉambra apartamento.
3. Studentoj, lernantoj, senlaboruloj, aŭ iuj, kiuj absolute ne povas pagi lupagon, povas dormi en dormsako sur la planko en la salono por 20 \$ por la du

sekvo...

La Riverego 3

Ni jam parolas la Pripensan

Probal Daŝgupto

Vi certe scias, ke la senpripensa konstruiĝo de la modernaj socioj nun venigis nin al apenaŭ solvebla krizo. Oni kreis fabrikojn kaj fervojojn, nur poste rimarkante, ke iliaj fumoj estas danĝeraj. Oni lanĉis socion de fridujoj, kaj malfruis noti, ke iliaj ellasaĵeroj truas la ozontavolon kiu nin ŝirmas kontraŭ radioj kancerkaŭzaj. Oni provizis la trian mondon per spektaklaj urboj, al kiuj do altiriĝis laborserĉaj vilaĝanoj. Nur nun ni konstatas, ke neni uzebla solvo de la ekvacioj liveros sufiĉan trinkakvon al tiel plenŝtopitaj urboj en regionoj tropikaj. Iuj konataj solvoj por tiuj problemoj ja ekzistas. Sed efektiviĝi ilin signifos, ke la homoj rekte forturnu sin de la hasta alkuro luksen. Kaj neni konata politika partio kuraĝas serioze proponi al siaj publikoj tian forturnon. Jen la krizo.

Tiun mankon de kuraĝo ne kuracos la politika areno mem. Ĉi tiu areno kapnombro spegulas la publikajn kapojn. Kaj tiujn kapojn kaptis,

...La kvara...

noktoj.

Por gruparanĝoj, kontaktu Normandon Fleury, telefone (514) 495-8442, telekopiile (514) 272-0151, retroŝte : <Normand.Fleury@sympatico.ca>.

Loĝi en Ludlow

Vi havas tri elektojn :

1. Loĝi en junulargastejo: *The Trojan Horse*, 15 \$ nokte, 802-228-5244
2. Loĝi en motelo/hotelo : estas dekoj de gastejoj en Ludlow. La plej malmultekosta, kiun ni povis trovi kostas 60 \$ nokte.

Programkotizoj 1997

Regula: 15 usonaj dolaroj ; studentoj, senlaboruloj/emeritoj : 5 usonaj dolaroj.

4 Somero de 1997

televide kaj retare, la reklama sistemo. La reklamistoj lule mesaĝadas, ke la alkuro luksen estas vivipova ĝenerala fluo. Inter tiuj reklamajoj troviĝas la ero, ke la mondaj publikoj povos partopreni ian anglan solvon de la lingvoproblemo, ian teknikan solvon de la mediaj problemoj aluditaj ĉi-supre, kaj tiel — sendiskute kaj senprobleme — plu.

Tiuj ĉi trukoj ĝis nun sukcese ostaĝigis la uzon de la konsiderinda inteligento de la publiko. Se ne vekigiĝos tiu publiko, precipe en la industriaj socioj, tiam certe la elementoj, kiuj estigis la krizon, ne solvos ĝin ! La normalaj kapoj en la metropolaj landoj volos uzi sian inteligenton, se ilin hardos pli da kontakto kun la normala vivo. Tiurilate montriĝas utilaj samtempe, kaj sammaniere, du unuavide malsamsektoraj ideoj. Unu estas la skolta ideo ke oni viglu kaj pensu per la tuta korpo — ne nur per la kapo. Kaj apudviciĝas la propono de la postmoderna kultura plurismo, ĝis nun gette flegata en la literaturaj kaj socisciencaj fakultatoj universitataj, ke la socioj ne lasu la decidokrean pensadon al siaj kapaj elitoj, sed « pensu » ekire de la manaj kaj piedaj socioj.

En niaj kuntekstoj la okupiĝo mem pri nia pripensa lingvo faras nin homoj pripensaj. En tiu rolo, ni eĉ sen aparta fortostreĉo komencas aliĝi al la laboro kontraŭ la senpripense konsumisma kunfludo kun la sindetruaj teknikadoraj sinlulemoj de la reklama mondo. Se ni ekkonstatas, ke ni jam estas tiaj, tiu ekvido donacas al ni ankaŭ pli klaran membildon. El tiu klaro, venos al ni kuraĝo. Kaj se ni, individuoj, trafos kuraĝon pionire propran, ne prunteprenitan el eŭrope kaj alikiale lacaj penskuvoj, eble do ni trovos por la Esperanta agado alian, *Pripensan*-instigan klavaron.

Konstrue ekde la nunaj kamaradecoj, nia pripensa areno maksimumigos ĉiesan partoprenadon. Ĝi ĉesos imiti la kapnombrian politikan voston de la televida ekranaro. Ĝia spektakle nova *Partoprenejo* ekzilos al nia fora infaneco la debaton... Participan, por geste omaĝi al la vortludemo, kiu longe nin savis de la pli kutimaj frenezaj.

La co-lecture

« C'est un terme que j'ai inventé et qui a le même sens que co-voiturage, mais pour la lecture. Échangez des magazines en vous abonnant collectivement. Plusieurs grandes entreprises le font déjà. Abonnez-vous à deux ou quatre (c'est vraiment le maximum pour un magazine mensuel, si l'on veut que chacun ait au moins une semaine pour le lire) et déterminez à l'avance les tours de lecture de chacun avant la date de circulation. Quand tout le monde a lu les magazines, mettez-les de côté et allez les porter (...) dans un lieu où les personnes n'ont pas les moyens d'en acheter mais ont besoin de lire.

Vous pourriez faire la même chose avec vos livres : mettez sur pied un système de fiches pour savoir à qui vous les avez prêtés et surtout, menacez d'écartèlement public ceux qui ne vous rapporteront pas les livres ! » [Paradis, France. *Le petit paradis. Tout ce que vous devez savoir pour vivre bien avec presque rien.*]

Pourquoi pas aussi en espéranto ? Sachez que tout membre de la S.Q.E. peut recevoir la liste des membres de la S.Q.E. Et sachez aussi qu'une bibliothèque espérantiste attend à Montréal celui ou celle qui voudra bien s'en occuper... et lire les livres avant tout le monde !

Rekte el Vaŝingtono

Normand Fleury

Directement de Washington, Normand nous parle de l'ambiance de la rencontre de fin de semaine des jeunes espérantistes états-uniens. D'autres rencontres sont en vue...

Jus okazis en Vaŝingtono la tria Junulara Esperanto-Semajnfino de la Usona Esperanto-Junularo. Ĉar ĉi-jare USEJ prifestas sian kvinjariĝon, la renkontiĝo estis pli vaste reklamita. Do alvenis 25 personoj, inter kiuj 3 el Montrealo (Reĝo, Patrice kaj mi). La aliaj venis el plej diversaj urboj en Usono kiel Ĉikago, Cleveland, Baltimore; venis eĉ Nepalano, kiu momente studas en Luiziano, Iranano kaj Ĉeĥino, kiuj ankaŭ lernas momente en Usono. La etoso estis pli internacia pro ili. Vendrede vespere okazis diversaj ludoj gvidataj de Joĉjo Truong (ĉeforganizanto) kaj ĉiuj bone amuziĝis kaj interkonatiĝis.

Estas interese noti, ke ĉeestis 4 prezidantoj: de USEJ, ELNA, Vaŝingtona klubo kaj mi por ESK. Mi enlitiĝis je noktomezo ĉar ja mi estis ellitiĝinta je la 5^a matene kaj estis veturinta 12 horojn por atingi la kunvenejon. Sabatmatene, ni iris piede vidi la Blankan Domon (nur de ekstere) kaj diversajn aliajn tre imponajn monumentojn. Vaŝingtono estas tre interesa urbo kun larĝaj avenuoj, multaj arboj kaj tre famaj konstruaĵoj kiel la Kapitolo, la Smithsonian Muzearoj, ktp.

Posttagmeze ni iris al la Nacia Bestĝardeno ĉar pluraj volis vidi pandon sed ĝi kaŝiĝis kaj ni ne vidis ĝin. Tamen ni lernis multajn bestnomojn kaj ŝvitis aŭ sunbruliĝis ĉar la vetero estis somereca. Vespere estis meksikieca vespermanĝo kaj, poste, longa kuketa gustumado. Ĉiuj kunportis kuketojn kaj tiel eblis gustumi specialaĵojn. Mi kunportis la acerfoliajn kuketojn bone konatajn en Kebekio sed tute ne en Usono. Okazis kunveno por diskuti estontajn

renkontiĝojn kaj estis diversaj anoncoj kaj sinprezentadoj. Ekzemple David Gaines ĵus verkis simfonion en Esperanto. Alia David parolis pri ELNA kaj pri la someraj kursoj en Hartford. Kelkaj poste iris al bierejo dum aliaj simple babiladis ĝis la 2^a matene. La junulgastejo troviĝis en la urbocentro kaj nokte estis malfacile dormi pro la oftaj sirenoj de policaj aŭtoj, ambulancoj aŭ fajrobrigadaj kamionoj. Terure, ni aŭdis de Usonanoj, ke nun Vaŝingtono estas la plej danĝera urbo en Usono sed mi ne sentis tion. Fakte mi eĉ vidis malpli da almozpetanoj ol en la urbocentro de Montrealo.

Dimanĉe, mi iris promenadi denove

por vidi la Kanadan ambasadejon. Certe aparte moderna kaj bela konstruaĵo, kiu bone harmonias kun la ĉirkaŭaĵo. Ni kune iris al ĉina restoracio por la lasta komuna manĝo kaj jen estas la ĝisoj... kaj kisoj. Mi tre ŝatis la tuton ĉar eblis al mi revidi malnovajn konatojn kaj konatiĝi kun tre interesaj homoj. Mi aldonu ke pli kaj pli da personoj unue lernas Esperanton rete kaj poste aliĝas al la movado kaj partoprenas renkontiĝon.

La venonta rendezvuo estos en aŭgusto por la 3^a NAJT (Nord-Amerika Junulara Tendumado) en la Montoj Blankaj de Nov-Hampŝiro kaj poste en oktobro en Vermonto. Ĉu mi revidos vin tiam?

Action des associations

Suzanne Bolduc

À quoi peuvent encore servir les associations espérantistes? Où vont-elles trouver les revenus nécessaires à leur fonctionnement? À la lecture de l'article *L'espéranto et Internet*, dans *La Riverego* du printemps 1997, me sont venues les idées suivantes.

Les associations peuvent diffuser de l'information sur Internet, grâce à un site Web, par exemple. Elles peuvent organiser des activités, et couvrir leurs frais soit par une contribution volontaire à l'entrée et en faisant payer les rafraîchissements, soit par une entrée payante (1 \$-2 \$).

Le bulletin de l'association

pourrait être publié sur le web plutôt que sur papier. Ceux et celles qui le désirent pourraient cependant payer un abonnement afin de l'obtenir par la poste ou par télécopieur.

Si on offre un service de librairie, son catalogue devrait être disponible sur le Web. La bibliothèque pourrait proposer des livres en location à l'unité (2 \$-3 \$). Elle pourrait donc même mettre à la disposition de ses membres des nouveautés, comme le font les bibliothèques de la Ville de Montréal.

Pour les campagnes publicitaires de l'association, on devrait trouver des commanditaires.

« Oni parolaŭs' ciel' »

L'espéranto est parlé par des gens de langues maternelles différentes. C'est évident. Et chacun le parle un peu à sa façon. Encore faut-il se comprendre et éviter le sort qu'on croyait inévitable, au XIX^e siècle : que chacun parle l'espéranto, mais tellement différemment que personne ne se comprenne. C'est arrivé avec le latin et l'arabe, et ça commence avec l'anglais, et même le français. Comme l'espéranto a comme *vocation* d'être une langue internationale, il faut à tout prix tendre vers une prononciation et un vocabulaire le plus standard possible.

Parlons donc prononciation. Il est à peu près impossible de faire disparaître toute trace de sa langue maternelle, et le jeu qui consiste à identifier la langue

maternelle d'un locuteur donné est assez facile. N'empêche qu'il faut le rendre le plus difficile possible, pour être sûr d'être compris. En d'autres termes, il faut viser une prononciation aussi standard que possible, tout en étant conscient que le but ne sera qu'approché, jamais atteint.

Le québécois présente souvent certaines caractéristiques de prononciation dont on doit tenter de se défaire. En premier lieu vient l'accent tonique. Comme tous les francophones, nous avons tendance à mettre l'accent sur la dernière syllabe, plutôt que sur l'avant-dernière. Sans accent tonique à la bonne place, on ne peut plus distinguer les mots.

Une fois, je me suis amusé à tenter,

avec beaucoup de succès, à m'imaginer que les mots espéranto se terminaient à ce qui est leur avant-dernière syllabe ; je « collais » la dernière syllabe au mot suivant. Alors, sans problème, je mettais l'accent tonique à la bonne place.

Les consonnes

Certaines des consonnes de l'espéranto nous causent des problèmes. Peu d'entre nous sont capables de rouler le R, comme en espagnol. Le R français sonne aux oreilles de beaucoup comme un H — d'ailleurs aussi difficile à prononcer.

Étrangement, ce sont sans doute le T et le D qui sont le plus transformés. Les Québécois ont tendance à les prononcer TS et DZ devant un I ou un U (ce dernier son n'existe heureusement pas en espéranto). TIEL devient alors CIEL (=TSIEL). Conclusion : parlons pointu...

Les voyelles

En québécois oral, les voyelles en voient de toutes les couleurs ; nous leurs faisons souvent subir le même sort en espéranto. N'oublions pas qu'en langue internationale, il n'y a que cinq voyelles, qui devraient le plus possible ressembler à elles-mêmes.

Alors, le I de *esti* et celui de *estis* devraient être identiques. De même, les deux E de *esperanto*. Et le O du nom de la langue internationale ne devrait pas changer selon que ce mot est à l'accusatif ou non : *esperanto*, *esperanto*n. Finalement (et cette remarque s'adresse particulièrement aux habitants de l'ouest du Québec) : ne diphtonguons pas : dans *mi amas*, le AS ne devrait pas sonner comme dans le mot français *passé*, mais comme dans *face*. D'ailleurs, si l'accent tonique est mis sur la bonne syllabe — l'avant-dernière —, ces glissements de voyelles ne se produisent plus.

Le perroquet s'ennuie

Il y a déjà quelques années, Patrice Mongeau a eu l'initiative d'un outil pour faciliter les liens entre les espérantistes montréalais, et même du Québec. Mais, comme tout outil, celui-ci ne sert à rien s'il reste à rouiller dans son coffre.

C'est hélas un peu ce qui se passe avec *la Papago*. Rappelons-le : *la Papago* (le perroquet) est un ordinateur relié en permanence à une ligne téléphonique, proposant d'abord un journal téléphonique quotidien en espéranto. Pour l'entendre, on compose le 270-7446, puis on suit les instructions. Chaque jour, le journal est constitué des contributions qu'ont laissées les appelants de la veille (il est cependant possible d'écouter les éditions des quatre jours

précédents). Pour contribuer, il suffit d'attendre la fin de l'édition du jour, ou d'appuyer derechef sur l'étoile, comme pour certains répondeurs.

Cependant, si la tendance se maintient, vous pourriez fort bien être surpris par le son du timbre dès après l'annonce du journal. En effet, la plupart du temps, le journal quotidien est vide. L'outil rouille dans son coffre.

Vu la faible fréquence des réunions espérantistes à Montréal, ce service pourrait se révéler très utile. Il est là.

D'ailleurs, *la Papago* peut aussi servir contacter par téléphone, avant toute rencontre espérantiste. Pour vous inscrire sur la liste, contactez Patrice Mongeau au 270-0054. Désolés, pas d'interurbain !

Jen nova jaro !

Normando Fleury

Vi eble pensos ke mi malfruas sed la financa jaro de Esperanto-Societo Kebekia finiĝas fine de majo. Estas do tempo prepari la diversajn raportojn kaj krome ĉi jare estas tempo pripensi pri nova estraro. Ni ŝatus vidi kelkajn novajn vizaĝojn en la estraro por iel alporti novan vigecon en ĝi.

Kio okazis ? Jen la ĉiama demando. Mi povus diri ne multe pli ol dum 1996 kaj nek multe malpli. Ni ja, danke al Marco Maertens, havas nun belan retan paĝon kiu alportas informojn. Sed krome, tiu reta paĝo multe helpas informi pri la venontajn renkontiĝojn kiel Okemo (oktobre en Vermonto).

Pri la financoj

Marco Maertens

Kvankam la financa jaro de ESK ne jam finiĝis je la limdato de tiu ĉi numero de *La Riverego*, mi jam povas raporti pri le ĝenerala stato de la financoj de la Societo por la jaro 1996-1997.

Ŝajnas ke la Societo finis la jaron kun eta perdo. La malprofito okazis grandparte dum la komenco de la jaro, dum kiu oni ricevis malmulte da aliĝoj. Malgraŭ la eta profito de la aŭtuna renkontiĝo, la Societo devis pagi novan inkujon por la fotokopiilo, kio igis la unuan jarduonon perda.

La estraro kunvenis regule kaj zorgis pri la servoj al la membroj. Mi dankas al Marco kiu zorgis la financojn kaj la sekretariajn taskojn, al Silvano kiu redaktis *La Riveregon*, kaj al Márta kaj Jean-Claude kiuj agis kiel konsilantoj. Mi mem okupiĝis pri la renkontiĝoj kaj informado.

En oktobro 1997, E.S.K. festos sian 15-jariĝon (dume esperanto estas 110-jara) ni do invitas vin proponi vian helpon por organizi ion « specialan », eble decembre.

Fine, mi amike invitas vin, kandidatiĝi en la estraro.

Ekde la kalendara jarŝanĝo, male, alvenis multe pli da realiĝoj. Plie, ni ricevis la kutiman subvencion de KEA, ĉi-jare je sumo de 104,80 CAD. Kvankam oni devas atendi la finan kalkulon, evidentiĝas, ke la membraro de ESK malkreskas. Tio signifas ne nur malpli da kotizoj, sed ankaŭ ke la kosto de *La Riverego* relative kreskas, kaj ke la subvencio de KEA malkreskas.

La aktivoj kaj pasivoj de la Societo restis plimalpli samaj krom la kompreneblaj ŝanĝoj pro la kutima funkciado.

C'est dans le mois de mai...

La recontre du Club d'espéranto de Montréal tenue en mai a été un franc succès (celle d'avril avait été gênée par une importante chute de neige). Autour d'un repas communautaire se sont réunies une vingtaine de personnes, dont quelques débutants. Une seule ombre au tableau : vue la durée du repas, la partie discussion s'est assez rapidement terminée.

Comme il y aura en juin une rencontre à Sainte-Catherine-de-Hatley, on ne tiendra pas de réunion à Montréal. Aucune réunion n'est prévue pour l'été, et le calendrier de l'automne n'est pas encore établi.

À moins de réunions de dernière minute, bien sûr. Si vous êtes de la région de Montréal, vous pouvez en être informé en vous inscrivant au service téléphonique de *la Papago*. Contactez Patrice Mongeau, au 270-0054.

At M^cGill

Stephen Sloan

The McGill Esperanto Club recently completed its second successful year. In the fall semester we offered a beginner's course in Esperanto once a week —many thanks to Sylvain Auclair for teaching the course. Since January we have been having a weekly one-hour discussion group at 550 Sherbrooke Street West (Room 1175 of the West Tower). We will continue to meet there on Thursday evenings from 7:30-8:30 p.m. at least until the end of June, and possibly for the rest of the summer as well. These get-togethers are quite informal and anyone is welcome to come. For more information you can contact me by phone at 844-4424 or by e-mail at <ssloan@physio.mcgill.ca>.

As I will likely be leaving Montreal by the end of the summer, I am hoping to find another McGill student to run the club for the next school year. If anyone is interested, please let me know.

ELNA à Montréal ?

La C.A. de la S.Q.E. discute actuellement de la possibilité d'inviter l'association états-unienne d'espéranto, *Esperanto-Ligo por Norda Ameriko*, à tenir son congrès annuel à Montréal, à l'été 1998. Le congrès de l'Association canadienne d'espéranto pourrait se tenir en même temps.

La raison ? Le groupe musical espérantiste *Kajto* participera l'an prochain à des activités musicales dans l'État de New York. Ses membres aimeraient en profiter pour chanter dans les cercles espérantistes nord-américains.

Si cette intention se concrétise, le congrès, d'une durée de quelques jours, aurait lieu juste avant le congrès mondial d'espéranto, à Montpellier (France). Évidemment, la Société aurait besoin de l'aide de nombreux membres bénévoles.

La Riverego 7

Kalendaro de venontaj okazaĵoj

13^a ĝis 15^a de junio. **Printempa renkontiĝo** de Esperanto-Societo Kebekia, en Sainte-Catherine-de-Hatley.

6^a ĝis 11^a de julio. Esperanto-kursaro ĉe la Universitato de Hartford (CT).

23^a de junio ĝis 11^a de julio. 28^a Somera Kursaro, en San-Francisko (Usono).

5^a ĝis 12^a de julio. 63^a Internacia Kongreso de **Blindaj Esperantistoj**, en Kievo (Ukrainio).

12^a ĝis 18^a de julio. **Internacia Esperanto-Konferenco**, en Rafina, apud Ateno (Grekio). Temo : *Helenaj influoj en la mondkulturo*.

19^a ĝis 26^a de julio. 82^a **Universala Kongreso** de Esperanto, en Adelajdo (Aŭstralio). Temo : *Toleremo kaj justeco en multkultura mondo*.

24^a ĝis 31^a de julio : 53^a Internacia Junulara Kongreso, en Assisi (Italio). Temo : *La homo — ĉu super aŭ parto de la naturo ?*

26^a de julio ĝis 2^a de aŭgusto. 19^a **Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj**, en Savudrija (Kroatio).

1^a ĝis 9^a de aŭgusto. 70^a Kongreso de **Sennacieca Asocio Tutmonda**, en Aŭgsburgo (Germanio).

9^a ĝis 17^a de aŭgusto. **Eŭropo-Azio 97**, en Jekaterinburgo (Rusio). Temo : *Nia mondo en la tria jarmilo*.

11^a ĝis 13^a de oktobro. **Aŭtuna renkontiĝo** esperantista, en Ludlow (Vermonto).

27^a de decembro ĝis 3^a de januaro. 14^a **Internacia Festivalo** por mezaĝuloj kaj junaj familioj, en Trier (Germanio).

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj : (514) 272-0151.

Traductions kafkaïennes

Le congrès universel s'est tenu l'été dernier à Prague. À cette occasion sont parues deux traductions de *La métamorphose*, du Pragois Franz Kafka. Dans le cadre d'une critique de ces publications (*Esperanto*, n° 1092, mai 1997), Jorge Camacho nous offre de comparer les deux traductions d'un même paragraphe. On verra rapidement que, souvent, un peu n'importe qui se croit compétent pour traduire. Et les initiés reconnaîtront rapidement l'original allemand sous les traits espéranto de la première version. Les voici donc.

« La sinjoroj klinis sin super la antaŭ ilin metitajn pladojn, kvazaŭ volus ilin antaŭmanĝe kontroli, kaj efektive distranĉis tiu, kiu sidis en la mezo kaj de la du aliaj ŝajnis rigardata aŭtoritato, pecon da viando ankoraŭ sur la plado, evidente por konstati, ĉu ĝi estas sufiĉe mola kaj ĉu ĝi eble ne resendotas kuirejen. » (Trad. Wilhelm Luttermann. *Sonĝo kaj aliaj rakontoj*).

« La sinjoroj kurbiĝis sur la alportitajn pladojn kvazaŭ ili volus kontroli ilin antaŭ la manĝo, kaj fakte tiu, kiu sidis meze kaj ŝajnis aŭtoritata al la aliaj du, eltranĉis pecon da viando ankoraŭ sur la plado, evidente por prijuĝi, ĉu ĝi estas sufiĉe mola aŭ ĉu oni devas resendi ĝin en la kuirejon. » (Trad. Mauro Nervi. *La metamorfozo*. *Serio Oriento-Okcidento* n° 31).

Kunsidis la estraro de UEA

La 3-taga kunsido, kiun aprilkomence partoprenis ĉiuj sep estraranoj, traktis entute 113 tagordajn punktojn. Inter ili menciindas :

- Novaj komisiitoj : La estraro rekomendas revivigi la Semajnon de Internacia Amikeco kaj nomumis S^{ino} Edvige Tantin Ackermann (Italio) kiel komisiiton pri ĝi. S^{ino} Lilia Fabretto (Italio) fariĝis komisiito pri rilatoj kun la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo (FAO) de UN kaj S^{ro} Hugh Martin (Britio) komisiito pri agado en arabaj landoj. S^{ro} Andy Kunzli (Svislando) estis elektita kiel ĉefrepresentanto de UEA ĉe la oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Nova prezidanto de la komisiono pri internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI estas Atilio Orellana Rojas (Argentino).

- La financa rezulto de UEA en 1996 estis escepte bona, danke al la granda UK en Prago sed ankaŭ al pluraj aliaj aferoj, kiuj realiĝis pli bone ol buĝetite. La bona rezulto estis tre bonvena por kompensi malkreskon de enspezoj en la nuna jaro, kiam UK estas malgranda. La baza membrokotizo (MA por Nederlando), laŭ kiu oni derivas la kotizojn por aliaj landoj, plialtiĝos en 1998 de 100 NLG al 103 NLG.

- La plivastiĝo de eksteraj rilatoj de UEA daŭras. UEA iniciatis fondon de Koalicio por Internacia Lingvo kun partopreno de internaciaj ne-registaraj organizaĵoj, kiuj havas rilatojn kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN. La 8^{am} de majo la Koalicio okazigos sian unuan seminarion en Novjorko. Simpozio pri kultura diverseco kaj multlingveco okazos baldaŭ ĉe la Europa Parlamento.

- Laŭ la modelo de la Nitobe-simpozio UEA organizos kadre de la UK en Montpeliero (Francio) en 1998 internacian konferencon « Esperanto en lernejoj ». Oni antaŭvidas aŭspicion de Unesko al tiu aranĝo, al kiu oni invitos ankaŭ aliajn ekstermovadajn organizaĵojn, edukajn instancojn kaj klerigscienulojn.

- Zagrebo (Kroatio) kaj Tel-Avivo (Israelo) akceptiĝis por la « finalo » pri la rajto gastigi UK en la jaro 2000. La ĝenerala direktoro inspektos la du urbojn ĝis la UK en Adelajdo. La finan decidon faros la estraro de UEA en Adelajdo aŭ komence de 1998. [*El Reta Bulteno de K.E.A.*, majo 1997]